Dua informilo

47a Internacia Seminario (IS)
27.12.2003 - 03.01.2004, Naumburg

Kiel atingi la ejon

La ejo de la ĉi jara IS estas renovigita kaj agrabla junulargastejo en la belega mezgermana katedralurbo *Naumburg*. Mapo de *Naumburg* troviĝas ĉe http://naumburg-tourismus.de/htdocs_de/stadtplan/map.pdf.

per aviadilo

La plej proksima flughaveno troviĝas en *Leipzig* (55km for).

per trajno

Naumburg bone atingeblas pere de la germana fervojo kun bonaj konektoj de *Berlin*, *Frankfurt/Main*, *Nürnberg*, *Erfurt* kaj *Leipzig*. Utila retpaĝo por plani la vojaĝon estas www.reiseauskunft.bahn.de. Ekde la ĉefstacidomo eblas aŭ promeni (ĉirkaŭ 45 minutoj) aŭ preni taksion (kosto estas ĉirkaŭ 6 EUR).
Se vi promenos, tiam de la stacidomo prenu la *Markgrafenweg* kaj sekvu ĝin ĝis ĝi finos en la *Roßbacher Str.* Iru dekstren tie kaj sekvu ĝin kaj ĝiajn daŭrigajn stratojn (*Moritzplatz*, *Lindenhof*, *Freyburger Str.*) direkto urben ĝis *Am Salztor*. Tie iru maldekstren kaj sekvu la *Am Wenzelsring* je la dekstra flanko de la strato ĝis *Bürgergartenstr* (unua strato post malsanulejo je la dekstra flanko). Sekvu ĝin ĝis maldekstre venos la *Charlottenstr.* Eniru la *Charlottenstr.* kaj preskaŭ tuj iru dekstren al la *Neidschützer Str.* Sekvu ĝin ĝis je via maldekstra flanko aperos *Am Tennisplatz* kaj la junlargastejo.

per aŭto

Se vi venos de la aŭtoŝoseo **A9** tiam prenu le elirejon *Naumburg* kaj sur la **B87** trapasu la unuajn 3 trafiklumojn rekte veturante. Post la 4-a iru maldekstren kaj post la 5-a trafiklumo iru denove maldekstren en la direkton de *Neidschütz*. Poste sekvu la indikilojn al la «*Jugendherberge*».
Se vi venos el la direkto de *Jena*, tiam prenu la **B88** en la direkton de *Weißenfels*. Post la 2-a trafiklumo por piediristoj iru sur la sekva strato dekstren. Poste sekvu la indikilojn al la «*Jugendherberg*».

Grave!

- La akceptado ne komenciĝos ĝis la 14-a horo posttagmeze la 27-an de decembro. *Bonvolu ne veni pli frue!!!*
  Litoj estas rezervitaj nur ĝis la 21a horo, se vi venos post tiu ĉi horo, sed volas havi la liton, bv, sciigi Martin Sawitzki (vidu sube).
- Ni ne zorgas pri malsanasekuroj de EU-anoj. Do, EU-anoj, bv. kunporti vian malsanasekuron (haveblas ĉe via malsanasekurejo). Se vi ne havas, bv. kontakti Martin Sawitzki (vidu sube).
- Ni ĉi jare intencos okazigi organizan merkaton, kie vi havos la eblecon prezenti viajn asociojn (ankaŭ ne esperantistajn) kaj konatiĝi kun la asocioj de aliaj.

Kion kunporti

Memzorgantoj kunportu dormosakon kaj aermatracon aŭ similalĵon. Ni ĉi jare ne havos matracojn en la memzorgantejo. Eblas ankaŭ manĝi por memzorgantoj en la junulargastejo kontraŭ la prezo de 13 EUR tage.

Plenpagantoj devas aŭ kunporti proprajn litolaĵojn (oni ne rajtas uzi dormsakojn en junulargastejaj litoj) aŭ prunti surloke kontraŭ 3 EUR.

Indas kunporti sportvestaĵojn, tablotenisajn rakedojn, kasedojn, KDjn, fotilojn, fotojn, lumbildojn kaj videofilmojn pri ĉiaj Esperanto-aranĝoj, ludojn, skribilojn kaj paperon, naĝkostumojn kaj dancŝuojn. Se vi volas kontribui al la muzika vespero (sed ankaŭ se ne!), kunportu viajn muzikilojn kaj muziknotojn.

Silvestra balo

Por kune ĝui la jarŝanĝiĝon ni okazigos abundan bufedon kaj silvestran balon kun kostumkonkurso kun la temo *«fivestado»*. Do, kunportu viajn plej aĉaspektajn vestaĵojn kaj provu ŝoki nin per via plej malbona gusto.

Kontribuu!

Programeroj ankoraŭ bonvenas. Bonvolu sendi viajn kontribuproponojn kiel plej eble frue al la koncerna respondeculo (adresojn vidu sube). Ni precipe invitas ĉiujn aktorojn kaj muzikistojn kontribui.

Volontuloj serĉataj!

La okazigo de la IS faciliĝas se ĉiuj ni iomete kunhelpas. La organiza teamo kore bonvenigas volontulojn kiuj povas fojfoje helpi en etaj, sed gravaj taskoj. Bv. anonci vin ĉe unu el la organizantoj.

Respondecas pri la enhavo de la dua informilo David-Emil Wickström

Adresoj

Administrado
Martin Sawitzki, Max-Planck-Ring 8d / L 56, DE-98693 Ilmenau,
tel.: +49 / 3677 / 844505, rete: is.admin@esperanto.de

Taga programo
Christof Krick, Alte Landstr. 26, DE-59872 Meschede,
tel.: +49 / 291 / 51535, rete: is.tema@esperanto.de

Vespera programo
Igor Lankin, Peter-Hille-Weg 11, DE-33098 Paderborn,
tel.: + 49 / 05251 / 4022367, rete: is.vespera@esperanto.de

Asocia adreso
Deutsche Esperanto-Jugend e.V., Einbecker Straße 36,DE-10317 Berlin,
tel./fakso: +49 / 30 / 428 57899, aŭ tel.: +49 / 177 / 28 34 320,
rete: bero@esperanto.de, hejmpaĝo: www.internacia-seminario.de

Adreso de la ISejo
JH Naumburg, Am Tennisplatz 9, DE-06618 Naumburg,
tel. +49 / 3445 / 703422 (*alvoku nur dum la seminario!*)

IS-poŝtelefono: + 49 / 160 / 20 21 650 (*alvoku nur dum la seminario!*)